

rakonto ŝi tiel konfuzis sin pri tiu enigmo ke ŝia koncepto pri ĝi enhavis kune la ideojn de ambaŭ teĵlaĵoj. Jen la vostrakonto aŭ rakontvosto:

Furi' diris al
Mus', kiun
trafis
li ĵus,
'Ni havu
proceson,
procesos mi
vin! Ne ekpenu
rifuzi; tio,
nur por amuzi
min, estas
necesa; defendu
do vin!'
'Ne utilus,
sinjor';
diris mus' kun
fervor'—
'Sen ĵugistoj
procesi
tempperdo
ja estas.'
'Mi vin
ĵugos
tut-sole'
—diris li
—ruzparole.
Li muson
kondamnis;
nun
sola
li
restas.

“Vi ne atentas” diris la Muso al Alicio kun severa mieno. “Pri kio vi pensas?”

“Pardonu” respondis ŝi tre humile “vi jam alvenis ĉe la kvina vostkurbo, ĉu ne?”

“Mi ne!” ekkriis la Muso.

“Mine', mine',” ripetis Alicio “do vi certe estas franca Muso; sed kial vi, katmalamanto, nun alvokas katon?”

La kolerema Muso tuj levis sin kaj ekforiris, jetante post si la riproĉon:

“Ne tolereble estas ke vi insultu min per tia sensencaĵo.”

“Mi ne intencis ofendi, vere ne!” ekkriis Alicio per petega voĉo “kaj vi ja estas tre ofendema.” Anstataŭ respondi, la Muso nur graŭlis kolere.”

“Revenu, mi petegas, kaj finu la rakonton” Alicio laŭte kriis al la foriranta Muso. Poste ĉiuj kriis ĥore: “Jes, revenu, revenu.” Tamen la Muso nur skuis malpacience la kapon, plirapidigis la paŝojn, kaj malaperis.

La Loro malkontente diris: “Estas domaĝo ke ĝi ne volis reveni,” unu maljuna krabino profitis la okazon por diri al la filino: “Ha, mia kara, tio estu por vi solena averto por ke neniam *vi* perdu la bonhumoron,” kaj la malrespekta krabido akre respondis: “Vi fermu la buŝon, panjo; vi ja difektus la paciencon eĉ al ostro.”

“Ho, kiel mi volus ke nia *Dajna* estu tie ĉi,” Alicio diris tion al neniuj aparte sed kvazaŭ ŝi volis mem aŭdi siajn pensojn, “ŝi ja kapablas tuj reporti ĝin.”

“Kiu do estas *Dajna*, se estas permesite tion

mm 10 20 30 40 50 60 70 80 90 100 110 120 130 140 150 160 170 180 190 200 210 220 230 240 250 260 270